BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO
8-6-1974

# Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL
Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul

CGC Nº
00406 504/1000-06

CORRESPONDÊNCIA PARA A SEDE
Edifício Jockey Clube, sala 103
Setor Comercial Sul - Brasília - (DF)
CEP 70.000

SECRETARIA
Caixa Postal 07 – 1182
Telefone 226-1298
70.000 – Brasília (DF)

**DEZEMBRO DE 1981** **ÓRGÃO OFICIAL DO BKE** **BOLETIM Nº 66**

## REDAÇÃO: MARIA ALMADA



D-ro L.L. Zamenhof, kreinto de la Lingvo Internacia Esperanto (1859 - 1917)

### 15-A DE DECEMBRO

En la pola urbeto Bjelistoko, la 15-an de decembro estis festo en la 1859-a jaro. Naskiĝis en tiu tago unu el la plej brilaj homoj de la mondo, L.L. Zamenhof, kreinto de la internacia lingvo Esperanto.

En 1887 li aperigis la unuan lernolibron pri Esperanto kaj ekde tiam la adeptoj de la idealo de Zamenhof festas lian naskiĝtagon tra la tuta mondo.

Nur ses jaroj antaŭ ol Esperanto fariĝi centjara, Brazilo gastigis la grandan mondmanifestacion, la 66-an Universalan Kongreson de Esperanto, kun mirinda sukceso.

Brazilo, la plej granda latinamerika lando, donis ekzemplon pri ĝia progreso kaj kulturo.

Tra la tuta lando, en ĉiu urbo kie ekzistas esperantistoj, oni festis la naskiĝdaton de nia Majstro Zamenhof.

### IX-A BRAZILA JUNULARA KONGRESO - 28/31-01-82

La Brazila Junulara Organizo ĉiujare kunvenas por pritrakti siajn farendajn taskojn. Ĉijare okazos en Natal, ĉefurbo de Rio Grande do Norte, de la 18-a ĝis la 31-a januaro. La nuntempa prezidantino kune kun la direktoraro serioze kaj diligente agadas. Montriĝis, ke ekzistas multaj gejunuloj bone parolantaj Esperanton. Ili surprizis la partoprenintojn de la 66-a UK.

La kongreskotizo estas Cr$ 900,00 kaj la evento okazos en la Marista Lernejo. Tag kaj vespermanĝo kostas Cr$ ... 360,00. La adreso estas: Kongreso-Komitato de la IV-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, Caixa Postal Nº. 291, CEP 59.000-NATAL (RN). Eblas aliĝi al la BEJO - Organizaĵo al pli aĝaj personoj ankaŭ.

Bonaj ideoj, sugestoj, prelegoj estos bone akceptataj. La direktoraro de Brazila Konsilantaro de Esperanto deziras al niaj karak geamikoj, futuraj gvidantoj de la Esperanto-movado en nia lando, plenan sukceson! Helpu ni la junularon!

### B K E

La 31-an de decembro finiĝis la mandato de la unua estraro de la organizaĵo.

Dum ĝia II-a Kongreso okazigita en San-Paŭlo, prezidanto Almada, en sia

festparolado baze de dokumentoj, informis al la anaro pri la granda aktiveco de BKE dum ĝia sepjara ekzisto. Diris li nur la veron, sen ia ajn intenco.

La direktoraro harmonie kaj entuziasme laboris. Ofte ne rimarkeble, sed iom post iom, la serioza laboro donis frukton, pri kiu ĉiu nia ano atestas. Danke al ĉiuj bonvolemaj kunlaborantoj, la Esperanto-movado estas forta en Brazilo. La jaro de 1981-a estis la ora epoko de nia Esperanto-movado. Ĉiuj kunlaboris kun siaj eblecoj por la sukceso de la historia 66-a U.K., kiu surprizis la mondesperantistojn.

La prezidanto Almada dankas al ĉiuj, kiuj fidele helpis al BKE dum lia mandato. Geamikoj, kiuj helpis aĉeti sidejon, kaj kiuj ebligis al ni regule eldoni nian Informan Bultenon. Sen via helpo ni ne povus sukcesi.

La redaktorino de nia informilo ankaŭ dankas ĉies helpojn, laŭdojn, kritikojn.

Estas nun petate al niaj geamikoj sendi de nun al la sidejo de BKE - Edificio Jockey Clube, sala 103 - Setor Comercial-CEP 70.000-Brasília (DF), ĉiujn kontribuaĵojn, leterojn, ktp.-Dankon.




**S-RO DRAGUTIN WRANKA**

Rapide pasis du jaroj ekde la forpaso de nia kara laborema kaj sindediĉa Dragutin Wranka, el Argentino.

"Li ne estis eminentulo en la esperanta movado, sed anonima laborinto", diris lia edzino, S-ino Serafina Wranka, en sia letero. Ek de lia esperantiĝo en Jugoslavio, kie li naskiĝis kaj elmigris, konstante li instruis la internacian lingvon. Li estis kunlaboranto de "Rio Esperantista" kaj lastatempe de nia Informa Bulteno.

Ni memoru ĉiam la grandajn, eminentajn esperantistojn, kiuj forlasis nin, lasinte laborojn, kiel tiu de nia amiko Dragutin Wranka, supre!

**MONO RICEVITA POR LA BULTENO**

Ni dankas la jenajn kontribuaĵojn de:

| | |
|---|---|
| Claudio Zimmermann | Cr$ 300,00 |
| Antonieta Almada Miranda | 1.600,00 |
| Salvador Raymundo | 1.000,00 |
| Dr. Luiz Antonio Loyola | 500,00 |
| Ruth Medeiros | 300,00 |
| Antonio R. da Silva | 1.000,00 |
| Dulce Paiva Whately | 2.000,00 |
| Anônimo | 25.000,00 |
| Rondeto Nova Mondo | 500,00 |
| | 32.200,00 |

**GAZETOJ RICEVITAJ**

Pernambuco Esperantista, Impacto, A Caminho da Luz, Correio Fraterno do ABC, Antaŭen, Sul do Estado, O Espirita Fluminense, Kvakera Esperantisto, A Gazeta, Diário de Taubaté, A Candeia, Sei, Jornal da Cidade, Sekso kaj Egaleco, Brazila Katoliko, Svisa Fervojisto, SER, Diário de Jacareí, Nova Era.

**TRA BRAZILO**
**RECIFE (PE)**

Alvenis el tiu urbo la "Pernambuco Esperantista", kiu alportis plurajn novaĵojn el la Pernambuka Esperanto-Asocio. Ĝi mencias la inaŭguron de nia sidejo dum la 66-a UK en Brazilio. La prezidanto de la societo, J. Markus Mabesoone, honorigis pere de lia ĉeesto la inaŭguron. Li estis brila brazila prelegínto dum la UK. Ĝoje ni rimarkis, ke post la UK aliĝis 35 novaj membroj al la societo. En decembro okazis elementa ekzameno de kursanoj kun interfratiga vespermanĝo. La UK-an partoprenis dek personoj el la ŝtato Pernambuko kune kun la pre-

zidanto Mag. Mabesoone. Ni deziras progreson al niaj karegaj geamikoj el Pernambuko.

**SALVADOR (BA)**

S-ano José Saraiva Matos sciigas nin, ke ka pasintjara de li organizita Studgrupo "Zamenhof" progresas kaj ili festis la 15-an de decembro la "Zemnhofan tagon". La Studgrupo funkcias en la kadro de la Spiritisma Federacio de Ŝtato Bahia.

La programo estis riĉa kaj tre utila por la gelernantoj, kiuj ĉijare nombras dektri. Pro manko de spaco ne eblas al ni aperigi ĉies nomojn, sed ni gratulas al ĉiuj dezirante progreson.

**BELO HORIZONTE (MG)**

El tiu urbo informas nin la Instituto Esperanto, ke plurajn gejunuloj klopodas numtempe reaktivigi ĝin. Ili komencis la agadon pere de artikoloj en "Jornal de Minas", elsendaĵoj de radio kaj TV bandeirantes (La Reportero - programo) diskonigi novaĵojn pri Esperanto.

Ili intencas organizi kursojn en la jena horaro: Lundon, mardon, ĵaúdon, kaj vendredon de la 15-a ĝis la 16-a horo (elementa kurso) kaj de lundo ĝis vendredo, de la 20-a ĝis la 21-a horo (ankaŭ elementa kurso). La prezo estas Cr$ 3.000,00 kun lernolibroj.

Tiuj kursoj komenciĝis en januaro. La Instituto Esperanto estas malfermita ĉiutage de la 14-a ĝis la 16-a horo kaj de la 19-a ĝis la 21-a horo. La adreso de la Instituto: Rua Guajajaras, 410-s/810, Centro-CEP 30.000-Belo Horizonte (MG).

Por komenci la agadon la esperantistaro festis la Zamenhofan Tagon kun interfratiga vespermanĝo. Ni gratulas kaj deziras sukceson.

**NITERÓI (RJ)**

La prezidanto de la Niteroi Esperanto-Societo, D-ro Joaquim do Couto, sendis al ni informojn pri la agado de la societo. Li aperigas bonajn artikolojn en "O Espirita Fluminense" el tiu urbo. Bonega propagando estas same, ke la "Guia de Eventos" de la urbo aperigas sciigojn pri la ekzisto de Esperanto-Movado en Niteroi. Ni gratulas.

**VOLTA REDONDA (RJ)**

Inĝeniero D-ro Alberto Flores, unu el el niaj ĝisostaj esperantistoj, el tiu progresema urbo, sciigas nin pri la finiĝinta Esperanto-kurso kaj bona agado en tiea Esperanto-societo. En la periodaĵo Sul do Estado aperis en la pasinta jaro 40 diversaj artikoloj pri la internacia lingvo. Estis disdonitaj pluraj esperantaj libroj kaj vortaroj, propagandcele. En speciale grava bulteno de la "Siderurgica Nacional" aperis granda artikolo verkita de li. Anka la spiritisma periodaĵo "A Caminho da Luz" aperigis plurajn artikolojn pri nia movado.

Al ĉiu estas konate, ke s-ano Flores sukcesis altkvalitan bultenon, pri la siderurgio, disdonadi dum la 66-a UK en Brazilio. La Kompanio, je lia peto, presigis la Bultenon speciale por la UK. S-ano Flores daŭre batalas por Esperanto kune kun s-roj Marcos Baylão kaj Luciano C. Pereira, kaj ili gvidos kursojn ĉijare depost marto. S-ro Flores estas unu el la fortaj kolonoj de nia movado.

Ni gratulas kaj deziras plenan sukceson.

Ni ricevis de nia Samideano D-ro Vicente Paulo Werneck, de Volta Redonda, interesan peton pri publikigo de la informoj rilataj al nova skribmaniero de la portugala lingvo pere de alfabeto simila al tiu de Esperanto. Temas pri la libro de nia samideano Onésimo da Costa Faria lanĉita antaŭ du jaroj en Porto Alegre (RS). La titolo de la verko estas "Ortofonografia da Língua Portuguesa", akirebla ĉe la aŭtoro, Rua Guajajaras, 410, sala 810 - CEP 30.000 - Belo Horizonte (MG). Fakte, se oni sukcesos enkonduki tiun metodon en la uzadon de la popolo, la afero fariĝus plo facila por la lernado de la portugala skribmaniero. Ni konsilas al tiuj, kiuj interesiĝos pri la afero sin turni al la aŭtoro laŭ la supra adreso.

**CAÇAPAVA (SP)**

S-ro Majoro Gilberto A. Silva Velho estas konata batalanto, kaj unu el la plej diligentaj kaj sindonaj kunlaborantoj de BKE.

Krom lia kunlaborado kun multaj gazetoj kaj periodaĵoj, en Caçapava kaj ĉirkaŭĵoj. Li gvidis kurson en "Nucleo de Caçapava da Cruzada dos Militares Espiritas". Li sukcesis esperantigi D-ron José Urzedo da Cruz, prezidanto de Rotary, inter aliaj elstaraj personoj.

Li planas nun organizi kurson en S. José dos Campos, kie li sukcesis konkeri al Esperanto prof-ron Domingues de Macedo Custodio, direktoro pri kulturo kaj turismo en tiu urbo.

Same li elkovris esperantistojn en la urbo Salto, kun kiuj li korespondadas.

Majoro Silva Velho krom esti diligenta esperantisto, ŝatas la trobojn. Ni aperigas la de li kaj de liaj familianoj kelkajn. Aparte ni dankas la konstantan helpon al nia Bulteno, kiun li donis dum tiuj sep jaroj.

Ni varme deziras, ke li estu daŭre fidela kaj helpema ano kaj kunlaboranto de BKE. Koran dankon por la ĝisnuna kunlaborado!

Troboj senditaj:

*Tirando a força da algema,*
*Da escravidão sofredora,*
*Uma Lei virou poema,*
*Nas mãos de uma Redentora.*
*Cidoca Silva Velho*

*Não te tormentes de mágoa,*
*Nem tua fronte se abata:*
*Rio sem pedra é só água,*
*Com pedra e queda - é cascata!*
*René da Silva Velho*

*Com seu jeitinho fagueiro,*
*a morena lá na praia,*
*estendeu bem seu redeiro*
*e nele espera que eu caia.*
*Gilberto A. Silva Velho*

**RIO DE JANEIRO (RJ)**

Kun granda nombro da associanoj, inkluzive de nia Prezidanto, S-ro Carlos A. Cunha, Brazila Esperanto-Ligo okazigis la 12-an de decembro ĝeneralan kunsidon, kiu elektis la jenan estraron por la laborperiodo 82/85: Fernando José Galvão Marinho, Prezidanto; Floriano Negreiros de Vasconcelos Pessoa, Vicprezidanto; Aloisio Sartorato, Kasisto; Luiz Alberto Brandão Martins, Sekretario Ĝenerala; Luiz Alan Gomes Romero, Unua Sekretario kaj Joel Vasques Manso, Dua Sekretario. Brazila Konsilantaro de Esperanto, per tiu ĉi Bulteno, deziras fruktodonan kaj feliĉan agadon al la nova prezidanto de BEL kaj ceteraj estraranoj, kun kiuj estas preta kunlabori por la plifortigo de Esperanto-movado en nia lando.

**SAN-PAŬLO (SP)**

La 12-an de decembro 1981-a okazis interfratiga vespermanĝo en la San-Paŭlo Esperanto Asocio.

En la sama tago estis jarkunveno kaj balotado por elekti la direktoraron de la societo por la venontaj tri jaroj. Estis elektita la jena estraro:

Prezidanto: Elvira Fontes (reeletita); Vicprezidanto: D-ro Walter Francini (same); 1-a Sekretario: Deodato França Mello; 2-a Sekretario: Francisca Martos; Kasisto: Jonas Felix de Oliveira.

Konsilantoj:

José Dias Pinto kaj Fany Dupré

Honoraj Membroj:

D-ro José de Freitas Nobre (deputito); D-ro Oswaldo Sangiorgi (direktoro de la kurso de TV-kulturo); S-ro Mello Ferrentini (de Diário Popular); D-ro Antonio Azzio Junior (de Folha da Tarde)

Membroj Bonfarantaj

S-ro José Dias Pinto kaj Waldir Lisboa Rocha.

Al na novaj administrantoj ni deziras sukceson kaj progreson.

Omaĝe al la Zamenhofa Tago, la 15-a de decembro, okazis disdonado de premioj al la konkurintoj de troboj, kies temo estis pensoj pri Esperanto. Dekkvin personoj ricevis premiojn.

En la sama tago grupo da esperantistoj estis invititaj de la TV "Bandeirantes" kaj "Record" por doni intervjuojn pri la Esperanto-Movado, landa kaj internacia.

Intertempe estis lanĉita la dua eldono de la lernolibro de F.S. Almada kun granda sukceso, pro tio ke pluraj estis tuj venditaj. Tiu libro estas pli ampleksa nun kaj oni povas ĝin akiri ĉe San-Paŭlo Esperanto Asocio - Caixa Postal Nº 5.888-CEP 1000-São Paulo (SP), aŭ en Santos ĉe la librovendejo "Pingo de Luz", Rua Marechal Deodoro, 11 - CEP 11100-Santos (SP). Ĉe Centro Esperantista de Santos, Rua Galeão Carvalhal, 31 apto. 73 - ankaŭ en Santos, tiuj libroj estas aĉeteblak, je Cr$ ... 120,00.

S-inoj Ruth Medeiros, Fany Dupré kaj aliaj laboremaj esperantistinoj organizis altvaloran bazaron en la sidejo de S.P.E.A. al kiu Maria Almada kontribuis pere de mempentritaj kartonoj, kiuj ankoraŭ estas aĉeteblaj en San-Paulo Esperanto-Asocio.

BKE deziras progreson al sanpaŭlanoj!

## ESTATUTOS DO CONSELHO BRASILEIRO DE ESPERANTO

Art. 1º - O Conselho Brasileiro de Esperanto, a seguir designado pela sigla CBE, constituído em 08 de junho de 1974, por prazo indeterminado, é uma sociedade civil de direito privado, sem fins lucrativos, com sede e foro no Distrito Federal, que visa à difusão e uso da língua internacional Esperanto, no País. Art. 2º - O CBE, para a consecução de seus objetivos, não faz qualquer distinção de nacionalidade, sexo, raça, religião, política ou condição social, tendo como programa de ação, entre outras, as seguintes atividades: I - manter um Serviço de Divulgação, que promoverá a realização de conferências, exposições, cursos, conclaves e a edição regular de um órgão informativo; II - estimular a edição de obras didáticas, técnicas ou literárias, em e sobre o Esperanto; III - formar um Serviço de Documentação, com a finalidade de compilar, selecionar e arquivar elementos que constituam acervo para a criação de um Museu do Esperanto; IV - manter um Serviço de Assistência Social, que coordenará as atividades do CBE, nesse setor; V - orientar, quando solicitado, a constituição ou regularização de entidades esperantistas; VI - estabelecer intercâmbio de interesses com organizações esperantistas, nacionais e internacionais, especialmente com a UEA (Universala Esperanto-Asocio), à qual se filiará. Art. 3º - O CBE será mantido pela contribuição de seus associados, bem como de donativos, legados e subvenções de qualquer natureza. Art. 4º - Integram o CBE os sócios segundo as categorias abaixo: **Categoria "A"** - organização especificamente esperantista; **Categoria "B"** - instituição esperantista especializada; **Categoria "C"** - pessoa física. Art. 5º - A adesão de pessoa jurídica ao CBE não acarreta qualquer perda ou diminuição de sua autonomia e far-se-á por solicitação escrita, acompanhada de um exemplar dos estatutos sociais e cópia da ata que elegeu a última Diretoria. Art. 6º - São direitos dos associados: a) exercer o voto; b) ser votado; c) fazer consultas; d) apresentar sugestões; e) receber as publicações oficiais; f) utilizar os serviços previstos no Art. 2º. **Parágrafo Primeiro** - A faculdade da letra "b" não se aplica aos sócios das Categorias "A" e "B". **Parágrafo Segundo** - Os votos dos associados terão os seguintes valores: 20 para a Categoria "A"; 10 para a Categoria "B" e 01 para a Categoria "C". Art. 7º - São deveres dos associados: colaborar na consecução dos objetivos sociais, mantendo em dia sua contribuição e demais obrigações. Art. 8º - As obrigações contraídas pelo CBE não se estendem a seus associados, nem lhes criam vínculos de solidariedade. Art. 9º - São órgãos do CBE: I - Assembléia Geral; II - Conselho Fiscal; III - Diretoria. Art. 10 - A Assembléia Geral é o órgão máximo do CBE, competindo-lhe, privativamente: a) eleger os membros do Conselho Fiscal e da Diretoria; b) decidir quanto à aquisição e alienação de imóvel; c) examinar as contas da Diretoria, tomando conhecimento do parecer do Conselho Fiscal; d) conceder títulos honoríficos; e) alterar os Estatutos ou determinar a extinção do CBE. Art. 11 - O Conselho Fiscal é composto de 3 membros efetivos e 2 suplentes, que terão mandato de 3 anos, podendo ser reeleitos. Art. 12 - A Diretoria é constituída de 05 Diretores, designados: Presidente, Vice-Presidente, Secretário, Tesoureiro, e Diretor Cultural, todos com mandato de 3 anos. **Parágrafo Primeiro** - É permitida a reeleição, no mesmo cargo, apenas para o período subsequente, nada impedindo que, após o decurso de um período administrativo, volte o Diretor a eleger-se para cargo anteriormente ocupado. **Parágrafo Segundo** - Os diretores poderão residir em qualquer parte do País, com exceção do Secretário e do Tesoureiro, que serão domiciliados em Brasília-DF. Art. 13 - É competência da Diretoria: a) aprovar orçamento proposto pelo Diretor Tesoureiro; b) nomear e descredenciar Delegados; c) admitir e demitir empregados. Art. 14 - São as seguintes as atribuições dos Diretores: I - **do Presidente** - a) representar o CBE, ativa e passivamente, em Juizo e fora dele; b) convocar as assembléias gerais; c) preencher os cargos vagos da Diretoria, "ad referendum" da Assembléia Geral; d) admitir e demitir sócios; II - **do Vice-Presidente** - a) subs-

tituir o Presidente e acumular o cargo de qualquer outro Diretor, impedido ou ausente; b) supervisionar as atividades dos serviços mantidos pelo CBE, exceto os de competência do Diretor Cultural; promover a segurança e a conservação de bens patrimoniais; III **do Secretário** - a) exercer todas as atividades normais da Secretaria; b) manter fichário atualizado de instituições e pessoas que sejam do interesse do CBE; IV - **do Tesoureiro** - a) responsabilizar-se pelos serviços de contabilidade, pela guarda dos documentos da Tesouraria, do numerário de Caixa e demais valores; b) assinar, isoladamente, recibos e documentos de circulação interna; c) assinar, com o Presidente ou, na sua falta, com outro Diretor, cheques, títulos cambiários, endossos e qualquer documento que possa onerar o CBE; V - **do Diretor Cultural** - dirigir o Serviço de Divulgação e estimular a edição de obras previstas no Art. 2º, inciso II. **Art. 15** - O CBE manterá um quadro de Delegados, sem direito a voto nas reuniões da Diretoria, incumbidos de promover os objetivos sociais, em suas regiões, podendo representá-lo em atos que não envolvam obrigações financeiras. **Art. 16** - As Assembléias Gerais serão convocadas 60 dias antes de sua realização: ordinárias, pelo Presidente; extraordinárias, pelo Presidente, segundo requerimento do Conselho Fiscal, da maioria dos Diretores ou de 2/3 dos associados em situação regular. **Art. 17** - A Assembléia Geral, observado o § 2º do Art. 6º, delibera validamente, do seguinte modo: a) normalmente, por maioria simples, não computados os votos nulos ou em branco; b) no caso do Art. 10, letra "d", são necessários os votos favoráveis de 2/3 dos associados. **Art. 18** - Todos os mandatos terminam em 31 de dezembro e iniciam-se, imediatamente, no dia 1º de janeiro subsequente, nos anos cabíveis, lavrando-se o respectivo termo de posse. **Art. 19** - Para as eleições de membros do Conselho Fiscal e da Diretoria, as chapas de candidatos deverão ser registradas junto à Diretoria, no mínimo 30 dias antes da Assembléia Geral. **Art. 20** - Todo e qualquer cargo eletivo será exercido sem remuneração, não se admitindo a distribuição de lucros, bonificações ou vantagens, a dirigentes e mantenedores, sob nenhuma forma. **Art. 21** - No caso de dissolução do CBE, o seu patrimônio reverterá em benefício de uma entidade congênere ou outra devidamente registrada no Conselho de Serviço Social. **Art. 22** - Os casos omissos serão decididos pela Diretoria, ouvido o Conselho Fiscal, ou na forma do Art. 17, letra "a". Disposições Transitórias. **Art. 23** - Os presentes Estatutos, aprovados em Assembléia Permanente, de 31 de outubro a 02 de novembro de 1981, entram em vigor na última data, com exceção dos Arts. 13, 14, 15 e 16, que passarão a vigorar em 1º de janeiro de 1982, quando se iniciará o mandato da nova Diretoria e do Conselho Fiscal, eleitos na mesma Assembléia.

**CURITIBA (PR)**

Laú decidite Curitiba estos la futura sidejo de la 2-a Suda Esperanta Renkontiĝo en septembro, 1982.

El tiu ĉarma urbo ni ricevis interesajn novaĵojn. Oni sendis al ni informon, ke "U.R.E.-1-a Região" aktivas konstante sur la adreso Rua Ermelino de Leão nº 315 pere de la Grupo Esperantista Espirita "Karitato", kiu kunsidas ĉiusabate je la 17-a horo, celante diskonigi Esperanton inter la adeptoj de spiritismo, promociante bazajn kursojn de la internacia lingvo, kio estas rezulto de la propagando farata de Spirita Federacio de Paraná.

Ni esperas, ke niaj geesperantistoj el tuta Brazilo ĉeestu la sudan renkontiĝon en la venonta septembro.

La informojn sendis al ni nia kara samideano Salvador Raymundo, al kiu ni dankas la kunlaboron.

**FLORIANÓPOLIS (SC)**

Alia grava kaj agrabla sciigo venis el ŝtato Sankta Katarino, kie la movado ĝis nun trankvile dormetis.

La bulteno "Antaŭen" el Florianópolis informas, ke okazos kursoj dum la jaro 1982. La kursoj gviditaj en 1981 finiĝis; ili estis faritaj en la "Academia Catarinense de Letras".

La Societo organizas perkorespondan kurson prizorgotan de la s-roj Glaucio Rodrigues Correia kaj Walter Boppré. Ni deziras al promociintoj daŭran progreson.

La 66-an UK-an partoprenis el tiu ŝtato 11 personoj.

**RIO GRANDE (RS)**

En tiu ĉi suda urbo de nia vasta lando ne mankas kunlaboranto al ni. Tie agadas niaj delegitoj D-ro Manoel Torres de Abreu kaj Kolonelo Dirceu Porciuncula.

La periodaĵo "Agora" publikis tutan paĝan artikolon pri la 66-a UK kaj pri la esperanta movado en Rio Grande.

Ni dankas la bonvoleman apogon kaj helpon de niaj karaj samideanoj, esperante, ke tio okazos ĉiame, ĉar BKE progresos kalkulante je tiaj bonaj helpantoj.

**II-A TUTAMERIKA KONGRESO**

En la ĉefurbo de Kolombio, Bogotá, okazos la evento.

BEJO deziras amase ĉeesti ĝin kaj kontakti aliajn grupojn de gejunuloj el diversaj amerikaj landoj.

Bogotá estas la unua paŝo al alproksimiĝo, ĉar la LKK de la II-A Tutamerika Kongreso de Esperanto akceptis la ideon unuanime kaj entuziasme. La baza laboro konsistas: Aktivigi - informi junulojn en iliaj esperantaj agadoj, trovi iun komunan laboron, interŝanĝi spertojn, plivigligi la junularan movadon en Ameriko, Ktp.

**DANKON AL ĈIUJ!**

Ni ricevis plurajn manifestaciojn pri la Kristnaskofestoj kaj Novjaro, el niaj brazilaj geamikoj kaj el tiuj de eksterlando, kion ni kore dankas, dezirante al ĉiuj egalan feliĉon kaj prosperon dum 1982.

**1982 - INTERNACIA JARO DE LA MALJUNULO**

**La Feliĉoj de la olduloj**

1 - Feliĉaj tiuj, kiuj komprenas miajn ŝanceliĝantajn paŝojn kaj miajn tremantajn manojn.

2 - Feliĉaj tiuj, kiuj konsideras, ke miaj oreloj devas klopodi por aŭdi tion, kion ili diras.

3 - Feliĉaj tiuj, kiuj perceptas, ke miaj olkuloj jam estas nebulitaj kaj ke miaj reagoj estas lantaj.

4 - Feliĉaj tiuj, kiuj devias la rigardon, ŝanjnigante ne vidi la kafon, kiun mi elverŝas sur la tablon.

5 - Feliĉaj tiuj, kiuj detenas min, kun afabla rideto por priparoli eĉ pri negravaj aferoj.

6 - Feliĉaj tiuj, kiuj diras al mi kompreneme: "Vi tion jam diris al mi plurfoje ..."

7 - Feliĉaj tiuj, kiuj scias direkti la konversacion kaj la rememorojn al la aferoj de la pasintaj tempoj.

8 - Feliĉaj tiuj, kiuj faras al mi senti, ke mi estas amata kaj ne estas forlasita.

9 - Feliĉaj tiuj, kiuj komprenas kiom kostas al mi trovi fortojn por kunporti mian krucon.

10 - Feliĉaj tiuj, kiuj faciligas al mi la paŝojn al "Patrujo" lasta afable kaj sindediĉe.

Sinjoro, mi petas por mia estonteco vian amon.

Por mia pasinteco, vian favorkorecon.

Por mia estonteco, vian bonŝancon.

**CURITIBA (PR)**

Nia kara Sam-ino Expedita C. Feitosa informas nin, ke estis elektita la jena direktoraro por la Paraná-Ligo de la Esperantista Junularo,kies adreso estas Caixa Postal N$^{o}$ 1398,CEP 80.000-Curitiba(PR). Jen la estraro: Prezidanto Paulo Cesar S. de Oliveira; Vic-prezidanto - Expedita de C. Feitosa; 1-a sekretario - José R. Rodrigues de Carvalho; 2-a sekretario - Itacir Ludtemberg kaj kasisto - Roberto Maurício C. Nunes.

La organizaĵo de la 14/7/81, kiam ĝi naskiĝis, luktas por vigligi la Esperanto-movadon.

Estas rimarkinda la progreso de Esperanto en Curitiba. Junaj profesoroj instruis kaj instruas la Internacian lingvon tie. Ni gratulas ilin.

Lastmomente!

**EAST - Esperanto-Asocio de San-Paŭlo**

La 24-an de januaro, la EASP, laŭ sia cirkulero, havos kunvenon. Okazos interfratiga tagmanĝo kaj poste estos pritraktitaj la farendaj taskoj en la jaro 1982-a. La programo estas:

1 - Fondo de eldonejo.

2 - Plano de eldono de lernolibro kaj vortaro.

3 - Kunsido de ILEI, kiu pritraktos la enkondukon de Esperanto en lernejojn kaj instrumetodoj, uzotaj.

La Direktoraro kunvokas ĉiunj membrojn kaj simpatiantojn de Esperanto por tiu grava evento.

## BALANÇO GERAL
## (31-12-81)

### A T I V O

| | | |
|---|---|---|
| **I – Circulante** | | |
| CAIXA | 22.800,00 | |
| BANCOS | 41.442,25 | |
| C/CORRENTES | 10.300,60 | 74.542,85 |
| **II – Realizável a longo prazo** | | |
| BENS RECEBIDOS EM DOAÇÃO | | 7.000,00 |
| **III – Permanente** | | |
| IMÓVEIS | 320.000,00 | |
| MÓVEIS E UTENSÍLIOS | 28.400,00 | 348.400,00 |
| | | 429.942,85 |
| **IV – Compensado** | | |
| PROMESSAS E REGISTRO DE DONATIVOS PARA SEDE PRÓPRIA | | 562.600,00 |
| | | 992.542,85 |

### P A S S I V O

| | | |
|---|---|---|
| **I – Patrimônio Líquido** | | |
| FUNDO SOCIAL | | |
| - Exercício anterior | 412.339,26 | |
| - Exercício de 1981 (Incremento) | 17.603,59 | 429.942,85 |
| **II – Compensado** | | |
| DONATIVOS SOB COBRANÇA | 14.500,00 | |
| DONATIVOS COBRADOS | 548.100,00 | 562.600,00 |
| | | 992.542,85 |

## DEMONSTRAÇÃO DA CONTA LUCROS E PERDAS

### D É B I T O

| | |
|---|---|
| DESPESAS COM O BOLETIM INFORMATIVO | 68.558,00 |
| DESPESAS DA SEDE PRÓPRIA | 101.068,00 |
| DESPESAS COM A CAMPANHA DA SEDE PRÓPRIA | 90.245,00 |
| DESPESAS COM CONGRESSOS PRÓPRIOS | 29.700,00 |
| DESPESAS DE DONATIVOS A ENTIDADES ESPER. | 9.825,00 |
| DESPESAS GERAIS | 15.474,00 |
| | 314.870,00 |
| - Superavit transferido p/Fundo Social | 17.603,59 |
| | 332.473,59 |

### C R É D I T O

| | |
|---|---|
| ANUIDADES | 22.800,00 |
| CONTRIBUIÇÕES PECUNIÁRIAS, RECEBIDAS | 92.963,00 |
| DONATIVOS PRÓ-SEDE PRÓPRIA, RECEBIDOS | 67.000,00 |
| RECEITA DE CONGRESSOS PRÓPRIOS | 49.350,00 |
| RENDAS DIVERSAS | 50.031,00 |
| RECUPERAÇÃO DE DESPESAS | 50.329,59 |
| | 332.473,59 |

Brasília (DF), 31 de dezembro de 1981

**(a) F.S. Almada - Presidente** **(a) Carlos A.S. Cunha - Contador**

*Centro de Cópias Cerqueira Compôs e Imprimiu*